



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 9 - 10
1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

El «La Sendefenduloj»

Kristnasko venis kaj kristnasko pasis, sed tio ne faris ŝanĝojn al la knaboj, nur odoris je graso kaj kukoj kaj aliaj frandaĵoj en la domo, multe pli ili ne spertis el la gloro. La familio kantis kelkajn himnojn unu vesperon, kaj iliaj infanoj kuris en la belvestaĵoj kaj ludis kaj uzis la ludilojn, kaj fine patro mem faris edifon kaj legis el la libro kvazaŭ li estus pastro, ili povis aŭdi tion tra la muro dum ili sidis kaj maĉis la vespermanĝaĵon. Ili ja iom okulumis unu al la aliaj, estas tiel tute male, ke patro mem estu piulo kaj legu el la Dia vorto. Kaj tuj kiam ili estis solaj, kelkaj komencis imiti — precipe Jakob Malpurulo estis lerta. Li scipovis ŝanĝi sian voĉon kaj imiti patron mem tiel, ke tio vere similis, kaj des pli oni ridetis al tio, des pli li fervoris kaj lertis. La ŝercemulo kiu loĝis en li, sed kiu tiel malofte kuraĝis aperi, la vera Jakob, elsaltis kaj fajre brilis inter ili. Li staris tie kun okuloj kaj aktoris kaj gestis kaj imitis patron mem

kaj estis vere nerekoncible. La malgrandaj, bulnoplajn manoj faris la samajn gestojn kiel patro mem, li tenis nevideblan libron en la aeron kaj suprentiris la suprolipon kaj montris la dentaĵojn kaj sukcesis simili al la ĉevaloviĝaĵo. Per kelkaj gestoj li desegnis Flugum'viron al ili, ke li aperis tute viva.

Kaj jen estis preskaŭ nenio pli, la tuto estis finita — finiĝis la kristnasko, kaj ek al la ago.

Gabriel Scott (trad. R.)

«Ĉirkaŭ la mondon»

Red. H. Fridén.

Por novuloj kaj lernemuloj.

«Al Benares! Al Benares!» Tiu krio kaj tiu sopiro kuŝas en la koro kaj en la buŝo de centmiloj da pilgrimantoj. Benares estas la Mekka de la piaj hinduoj. En Benares regas ekstrema sankteco. Ne nur la akvo, sed eĉ la tero kaj la aero estas tiel sanktaj, ke ili purigas la homojn de ĉiuj pekoj.

En Benares 200 000 loĝantoj vivas per la mono de 500 000 pilgrimantoj, kiuj venas ĉiujare al la sankta urbo, piede, boate, fervoje aŭ sur la dorso de elefantoj. Ĉiu hinduo devas kaj deziras viziti la urbon Benares almenaŭ unufoje en sia vivo. Benares estas plenŝtopita de 2 000 temploj, 200 000 dioj kaj 40 000 preĝistoj. Ĉu tio ne estas sankta urbo *par excellence*?

Per la pilgrimado al Benares la puno de la renaskiĝo estas faciligata. La animo ne devos renaskiĝi en la korpo de besto. Kaj tiuj homoj, kiuj estas tiel feliĉaj, ke ili mortas en Benares, estas tuj tute liberigataj de plua renaskiĝo. Kredo malnova de 2 500 jaroj. Multaj maljunuloj venas al Benares por prepari sin al sia morto. Ankaŭ arego da «sanktaj homoj» loĝas dum monatoj kaj eĉ jaroj apud la Ganges-rivero, levante unu brakon konstante ĝis ĝia kripliĝo, aŭ kuŝante sur akraj pikiloj, aŭ suferante aliajn dolorojn. Estas kvar milionoj da tiaj sanktaj homoj en Hindujo, kiuj vivas per la almozoj de malriĉuloj. Multaj el tiuj «sanktuloj» estas «sanktaj friponoj», — klarigas al mi hinda universitata profesoro.

Sopiro — lingsel

pia — gudfryktig

pur-ig-i, rense gjøre ren

peko, synd

piede, boate, fervoje — tilfots,

med båt, med jernbane

preĝ-isto, bedende, «bønnemenn».

puno — straff

facil-ig-at-a, blir lettet (generelt)

liber-ig-at-a, befridd (også generelt)

kripl-ig-o, forkropling, det å bli forkroplet

almoz-o, almisse

fripono, skurk, kjeltring.

La Kontor fondaĵo

Pli frue	kr. 695,00
J. Matland	» 25,00
Gjøvik Esperantoklubb »	20,00
H. Danelsen	» 201,00
C. S. B.	» 10,00
	Kr. 951,00

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

HELSINGØR

La internaciaj feriaj Esperantokursoj de la venonta somero okazos 20.—26. de julio en

La internacia Alternejo de Helsingør, Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

DK-8230 Åbyhøj

Danlando

NB. Speciala karavano el Helsingør al *UK en Helsinki* estos aranĝata. Ekiro 26/7 matene, alveno al Helsinki tagmeze.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

Kristnasko

Ni elektis ion el nia literaturo por la unua paĝo —el la korŝira libro de Gabriel Scott, «La Sendefenduloj». Jen li priskribas la kristnaskon de la knaboj en la infanhejmo. Sed tio ja ne estas kristnasko, vi diras. Kaj vi eble ankaŭ diras: «Tiaj infanhejmoj ne plu ekzistas.» Kaj vi pravas — se vi ne pensas pri pli ol nia propra lando. Sed ni ne estas solaj en la mondo.

La redakcio ricevis leteron de nia malnova samideano Alf Hasle. Li skribas i.a.: «Mi nun ekhavis ideon kiu eble povas fari duoblan utilon, nome aktivigi esperantistojn kaj havigi helpan al forlasitaj infanoj. Ĉu vi aŭdis pri la SOS-infanvilaĝoj? . . . Multaj norvegoj jam «adoptis» infanojn en SOS-

vilagoj en diversaj partoj de la mondo . . . Se ankaŭ esperantoklubo partoprenus, ili povus eble veki iomete da intereso por sia movado ĉe la SOS-organizaĵo. Skribante al la infanoj, la esperantistoj kompreneble rakontus pri sia lando, siaj hejmlokoj, sia lingvo . . .»

La ideo estas bonega. Ne nur ĉar ĝi montros al la cetera mondo, ke esperantistoj estas homoj, kiuj povas pensi pri io alia ol la lingvo, sed precipe, ĉar ĝi donos helpon al iuj, kiuj bezonas helpon. Kaj ni pensu ankoraŭ pri aliaj — ĉie en la mondo estas suferantaj infanoj. Se en Norvegujo ne plu ekzistas la «sendefenduloj» pri kiuj Gabriel Scott verkis, ili abundas aliloke. Kaj nun *ni* ne rajtas sidi sen agi.

Emulo.

Norvega Kongreso

La 41-a Norvega Esperantokongreso okazos en Budor Turisthytte, Løten, la 28an kaj 29an de Junio 1969, laŭ invito de la Esperantoklubo «La tri verdaj steloj de Løten».

Ni petas niajn membrojn jam nun plani sian someron tiel, ke ili povos grandnombre partopreni la kongreson.

Pliaj detaloj sekvos en la venontaj numeroj kaj en cirkuleroj.

La Liga Estraro.

Sciigoj de N.E.L.

Kursoj. Jam estas tempo plani la kursojn dum la venonta printempo sezono. Kluboj, kiuj spite nian insistan alvokon, tamen ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas nepre aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. — Sen kursoj neniuj progresoj. Kaj ĉiuj kluboj ja devas progresi!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbis kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,00 kiam li sendas la mendon. Prezoj: Parto I: kr. 23,00; parto II: kr. 25,00; ambaŭ partoj kune: kr. 42,00. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,00, kr. 19,00, kr. 32,00.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L.. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Taskotabelo por la kluboj. — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi la kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj la varbadon de novaj Individuaj Membroj de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Tuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj pritraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton kaj studraporton pri la 2a jaruono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raportojn pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

La Liga Estraro.

La Fantomo

Mi estis tre juna tiam, kaj sciis ĉion, kiel junuloj ja scias ĉion. Jam dum pluraj jaroj mi oficis en malgranda loko kun manpleno da enloĝantoj. La laboro estis interesa, sed jam post nur mallonga deĵoro, mi vidis la superstiĉemon de tiuj naivaj homoj. Sed tio estis facile komprenebla. Ili loĝis longdistance for de kulturaj centroj. Anstataŭe ili vivis tre proksime al la granda maro, kaj ofte devis vidi la morton forpreni jen iun, jen alian.

Jes, la superstiĉo regis. Pluraj jam rakontis al mi la fabelon pri la fantomo. Ke ili ne mem povis kompreni, kio sin kaŝas malantaŭ ĝi! Jen ili rakontis: «En griza, nebula tago mi vidis lin. Li iris laŭ la sabla strando, malrapide kaj peze. La paŝojn li rektis al la sabla altaĵo tie ekster la malnova, ne plu uzata tombejo. Kaj alveninte tien, li malaperis. Sed la plej stranga: li ŝajne ne havis kapon.»

Strange — en lumaj, helaj tagoj neniuj vidis lin. Kvankam ofte iris viroj laŭ la strando. Ja estis la plej facila vojo al kajo kaj butikoj. Nur en grizaj, nebulaj tagoj ili vidis lin. Kompreneble, ĉar en la lumaj, helaj tagoj ja ĉiu povis vidi, kiu paŝas laŭ la strando. Tra la nebulo ne estas tiel facile rekoniri iranton eĉ se tiu estas najbaro. Kaj jen la kredo, la superstiĉo helpas. Ke ili mem ne povas tion kompreni!

Sed feliĉe — la teĥnika kulturo iom post iom alvenas ankaŭ al tiu loko kaj kunportos siajn benojn.

Vidu nur: jen granda maŝino kiu elfosas grandajn amasojn da tero kaj faras longan fosaĵon en kiun oni metos tubegojn por akvo. Baldaŭ la akvo fluos, kaj la kompatindaj virinoj ne plu bezonos per sitejoj preni sian akvon el la profundaj putoj ekster la domo. Kaj eble oni per tiu akvo povos eĉ aldoni fluoron, tiel ke dentaj truoj ne plu ekzistos! Jes vere, kiu vivos, vidos.

Ĉar ĉi tio estas nur la komenco. Kaj vidu, la infanoj, kiuj neniam estis ekster la hejmloko, kaj ĝis nun vidis nur boatojn kaj unu solan ŝarĝaŭton, nun povas rigardi tian gigantan maŝinon. Tio certe kreos ĉe ili sopiron, soifon je pli granda scio, je plia teĥniko, je transloĝo al iu urbo. Kaj certe la infanoj lernos, ke fantomoj ne ekzistas.

Jen la ŝarĝaŭto revenas kun sablo. Ili elfosas sablon en la proksimo de la malnova tombejo, kaj metas ĝin en la fosaĵon, ke la tubegoj kuŝu en sabla kuseno kaj tiel ne riski difektojn. Mi ne scias, kiu planis ĉion, sed certe ne estas iu loka loĝanto.

Sed jen — la telefono. Estas la ŝarĝaŭta ŝoforo. Kaj li urĝe petas, ke mi venu. Kio okazis? Li ne volas rakonti tion per la telefono, sed urĝas.

Tuj mi pensis pri mia filo. Antaŭ nelonge li ricevis sian unuan duradan biciklon, kaj nun fervore ekzercadas sur la vojo. Estas nur unu vojo — tiu sama per kiu la ŝarĝaŭto tien-reen veturadas.

Ĉu — ĉu estis kolicio? Kio okazis? Ne miru, ke mi ne hezitis, sed remetinte la telefonaŭskultilon tuj kuris, jes kuris, eksteren kaj laŭ la vojo al la malnova tombejo.

Tie li estas, la ŝoforo. Sola. Li ridetas, kiam li vidas min — kuran kaj kun ruĝa vizaĝo pro la neordinara energiuzo. Mi iom ĉagreniĝis pro la rideto, sed kompreneble li nur volis esti ĝentila, kaj la krudaj homoj tie ĉi ne ĉiam scias konduti dece. Mi do nur demandis: «Ĉu li estas serioze vundita?» «Jes — tre», respondis la ŝoforo kaj komencis iri antaŭ mi. Jen mi vidis la ŝarĝaŭton — ĝi staras ĉe la sabla altaĵeto ekster la tombejo. Sed mi ne vidas mian filon. Eble jam oni transportis lin al boato al la malsanulejo en la plej proksima urbo? Kelkaj viroj kun fosiloj staras tie — senlaboraj.

Mi aliras. «Rigardu», diras la ŝoforo, «kaj konsilu al ni, kion ni faru.» Mi rigardas. Sube en la truo, el kiu prenis la viroj la sablon, estis ligna kesto kun granda truo en la kovrilo. Tra ĝi mi vidis skeleton. Do, homo entombigita antaŭ jaroj — sed ekster la tombejo. Kaj eĉ pli mirige: La kranio ne estas ĉe la ŝultroj, sed sur la pelvo. Sed tio ankaŭ klarigas la aferon. Temas pri krimulo el la kruelaj tempoj kiam oni punis per senkapigo. Kaj por igi la punon eĉ pli kruela, oni entombigis la kadavron ekster la tombejo. La superstiĉuloj ja kredis, ke oni tiamaniere kondamnis al eterna malpaco, kaj ke nur entombigo en

sanktigita tero povos redoni la pacon al la kompatindulo.

«Nu, kion ni faru?» denove demandis la ŝoforo. Hazarde mi sciis, ke entombigo okazos post du tagoj en la nova tombejo. «Prenu la ostojn kaj metu ilin en keston», mi konsilis, «kaj telefonu al la pastro, kaj aranĝu kun li kaj la tombeja fosisto, ke tiu kesto estu metota en la tombon sub la entombigoto.»

Jes, vi povas mem vidi — oni eĉ ne sciis kion fari je tia okazo. Sed mi ja jam rakontis, ke estis en malgranda loko, al kiu la kulturo ankoraŭ ne venis. Sed oni devis konsiliĝi ĉe homo, kiu venis el la pli granda mondo. Kaj oni agis laŭ la konsilo.

Kio okazis poste? Nenio. Eĉ la rakontado pri la fantomo silentis. Neniu plu vidis la fremdan, senkapan viron iri laŭ la strando en griza, nebula tago. Ĉu oni bezonas pluan pruvon pri la beno de la teĥnika kulturo? Tiel simpla afero, kiel akva tubo, kiu alportas fluantan akvon al la domoj, povas forigi superstiĉan rakonton! Kio okazus, se ili vere ricevus la fruktojn de teĥniko?

Haro

★

54-a U. K.

Helsinki, 26. VII. — 2. VIII. 1969

Alta Protektanto: D-ro Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Ekskursoj. Antaŭ la U.K. ekskursoj al:

- a) Orienta Laga Regiono (22.—25. jul.) Prezo: 312,00 ned.gld., ĉion inkluzive.
- b) Laplando (23.—25. jul.) Prezo 385,00 ned.gld., ĉion inkluzive. Dum la Kongreso tuttagaj ekskursoj al:
 - a) Porvo — Prezo 20,00 ned.gld.
 - b) Lahti — Prezo 30,00 ned.gld.
 - c) Hämeenlinna — Prezo 32,00 ned.gld.

En pluraj tagoj dum la Kongreso ekskursoj en Helsinki:

- a) per aŭtobuso (dumtage) — Prezo 10,00 ned.gld.
- b) per ŝipo (vespere) — Prezo 9,00 ned.gld.

Post la Kongreso neoficiala ekskurso al:

- a) Leningrad (3.—6. aŭg.) Prezo 383,00 ned.gld. ĉion inkl. Detaloj kaj mendiloj troviĝos en la Dua Bulteno, kiun ĉiu aliĝinto ricevos en Decembro 1968.

Oficiala Postkongreso en Turku 2. VIII. — 6. VIII. Prezo: 155,00 ned.gld., ĉion inkluzive. Detaloj kaj mendilo troviĝos en la Dua Bulteno.

Loĝado. La prezoj por loĝado estas la jenaj:

- Komuna Loĝejo (plurlitaj ĉambroj): de 6 ĝis 9 ned.gld.
 - Kategorio «Turista»: 9—21 gld.
 - Kategorio Dua: 11—29 gld.
 - Kategorio Unua: 25—47 gld.
 - Kategorio Luksa: 33—46 gld.
- Detaloj kaj mendilo troviĝos en la dua Bulteno.

Infana Kongreseto.

La 11-a Internacia Inf. Kongr. okazos en la kadro de la 54-a UK.

Aliĝkotizo: 50,00 ned.gld. Aliĝiloj riceveblaj ĉe la konstanta adreso de Kongreso.

Statistiko (ĝis 30/10 1968). Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstr. 1, Belg. 4, Braz. 2, Brit. 15, Bulg. 10, Ĉeĥ. 2, Danl. 4, Finnl. 21, Franc. 26, Germ. 9, Grek. 1, Hisp. 6, Hung. 5, Isr. 1, Ital. 6, Jap. 3, Jug. 11, Kan. 1, Ned. 14, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Poll. 4, Port. 2, Sov. 1, Sudano 1, Sved. 12, Svis. 4, UAR 2, Usono 10. Entute 187 el 31 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

RECENZOJ

Biblia Revuo. Nova Serio.
Eld.: Itala Biblia Societo.

Kiam la unua serio de Biblia Revuo aperis, kun redakcio en Aŭstralio, presita sur la Filipinoj, mi havis i.a. la honortaskon varbi abonantojn. Tio montriĝis tre malfacila afero, ĉar jen iuj dubis, ke tia fakrevuo en Esperanto povus havi sufiĉan kvaliton. Aliaj jam vidis numerojn, kaj trovis la nivelon tro alta. Kaj fine la revuo ne plu povis aperi — la kostoj estis tro altaj kompare al la modesta abonantaro.

Nun la revuo reaperis. La redakcio estas la sama, la kunlaborantaro estas pli granda, sed la presigo kaj la eldono transiris al Italujo. La aspekto estas tute alia:

Impona, grandformata. Kaj la nivelo estas la sama. Jen do kion ni vere bezonas en Esperantujo: Fakliteraturo pri kiu la veraj fakuloj ne povas nur rideti, sed kiu iom post iom ricevos tutmondan atenton kaj respekton vaste ekster la kadroj de la esperantistoj. Se ni esperantistoj donos al ĝi sufiĉe longan vivotempon.

Hans Amund Rosbach.

Socialisma Romano

Hans Kirk: Taglaboristoj. El la dana tradukis L. Friis kaj W. Jensen. 2-a eldono per Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj.

La unua eldono aperis 1941 ĉe Libroservo Federacio de Laboristaj Esperantistoj, Amsterdam, kaj la nuna estas fotorepreso de tiu unua eldono, tiel ke la tuta aspekto estas la sama, eĉ preseraroj. Nur estas la papero malpli dika, tiel ke la libro estas pli plaĉa, kaj la kovrilo estas pli bonkvalita.

Hans Kirk estas unu el la danaj «labor-verkistoj» kaj tiu libro estas la unua el trilogio (kies tria volumo tamen neniam aperis, ĉar la manuskriptoj perdiĝis dum dummilita malliberigo de la aŭtoro). Ankaŭ aliajn librojn Kirk verkis, kaj dum pluraj jaroj li laboris ĉe la dana komunista gazeto Land og Folk.

La romano do havas fortan socialisman tēndecon, tro fortan. Oni tuj sentas, ke Kirk konas siajn tipojn — la taglaboristojn, kies vivo dependas de la perioda laboro

ĉe la bienoj, ĝis iu dan-amerikano venas kaj ekkonstruas fabrikan, kaj tiel certigas laboron al ĉiu. Sed kvankam oni komprenas, ke Kirk konas sian medion, ni ne povas liberiĝi de la sento, ke ne estas homoj, sed tipoj.

Des pli oni sentas tion, dum oni renkontas la «malamikojn» de la laboristoj. Unuflanke estas la bienuloj. Ili ne renkontas multan komprenemon ĉe Kirk, ili estas la riĉuloj, kiuj ekspluatas la laboristojn. Kaj iliaj problemoj ne estas agnoskataj.

De la alia flanko la laboristoj estas premataj de la eklezio, reprezentata de la pastro Gamst kaj la piuloj en la Interna Misio. La pastro estas unu el tiuj tipaj literaturaj pastroj, kiuj ne fidis al tio, kion ili mem predikas, sed predikas nur pro sia bona salajro. La misiisto estas tia, kiu nur promesas fajron kaj sulfuron al la nekonvertiĝantoj. Li tamen mem estas honesta, kio montriĝas el peka falo kun posta sinmortigo. La aliaj kristanoj estas hipokrituloj, kiuj pretas helpi per bibliaj sentencoj, sed ne per iu ajn ago nek per monero.

La tuta romano do estas bildo pentrita per tre larĝa peniko. Tiel detaloj mankas. Oni tute bone vidas la motivon, oni eĉ ekŝatas la homojn, kiuj ricevis vivon — sed tamen sentas, ke la problemoj meritis pli justan pritrakton.

Lingve nemakula. Literature agnoskata. Aspekto tre plaĉa. Kun la supraj rimarkigoj vere rekomendinda.


Haro.



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA FERVOJISTA ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kaldbakkstubben 22, Oslo 9



Unika fervosakcidento

Kune kun mia edzino kaj filineto mi vizitis la sveda urbon Kristinehamn, dum brila semajnfino en aŭgusto 1967. Post agrabla kunestado kaj motorboatekscuro sur lagego Vänern, ni veturis hejmen per trajno.

Dum haltado en Karlstad, mi ekvidis sinjoron kiu interparolis kun la trajnĉefo, kaj tuj mi observis en lia butontroo grandan verdan stelon. Mi salutis esperante, kaj montriĝis ke estas kolego Herman Nordling de Kil.

Montriĝis ke ni ambaŭ estas fervojentuziasmuloj, ke ni amas kuriozajn fervojojn.

Li donis al mi la ĉi supran foton de la norvega Urskog—Hølandsbanen, kaj li rakontis: «Okazis dimanĉmatene 1949 aŭ 1950.

La nokt-trajno Stockholm—Oslo devis halti en stacio Sørumsand, kaj miaj du filoj, eliris por rigardi la amuzan liliptutrajnon, kiu plena de turistoj, ekveturis al Skulerud.

Sur la stacidoma kajo ludis blorvestro, kaj ĉiuj pasaĝeroj en unu el la liliptutfervoja vagonoj, staris sur la sama flanko.

La trajnekspedisto ekveturordonis, la trajnĉefo fajfis kaj svingis la verdan flageton, la lokomotivestro reagis korekte, eble iom tro fervore. Kiam la trajno ekveturis, la vagono renversigis.

Spontane la muzikistoj kaj la vojaĝantoj kune kuris al la vagono, kaj per unuigintaj fortoj ili levis la renversitan vagonon sur la relojn, kaj la trajno povis laŭplane veturi al Skulerud. Hazarde unu el miaj filoj kaptis bildon pri tiu stranga okazintaĵo, kaj jen la foto; — nia sveda samideana kolego rakontis.

Kaj dank' al Esperanto mi sukcesis havigi al Jernbanemuseet, al A/L Hølandsbanen, kaj al nia Fervoja Paĝo ĉi tiun historion kaj foton.

Per Johan Krogstie.

Adiaŭo de la Fervoja Kariero

Je la 27a de januaro 1967 kol. K.G.J. de Jong, prezidanto de IFEF atingis la 65an jaraĝon kaj forlasis la aktivan deĵoron.

Multaj fervojaj aŭtoritatuloj ĉeestis la oficialan adiaŭan kunvenon. La estro de la Distrikto, s-ro Leertouwer, en longa parolado skizis la oficistan karieron kaj laŭdis lian energian kontribuon por la organiza strukturo.

Poste multaj aliaj parolantoj dankis pro la ĉiam bona kunlaboro.

Kiel reprezentantoj de la Esperanto

movado ĉeestis: La ĉefkomitato de IFEF kaj prezidanto de F.E.R.N. kol. Laborus, la IFEF kasisto kol. Oosterwijk kaj F.E.R.N. sekretario v. Leeuwen.

Kaj tiel ankaŭ nia IFEF prezidanto apartenas al la pensiitaj membroj. Ĉiu kiu konas lian viglecon kaj ĉiamen junan energion apenaŭ povas imagi ke ankaŭ jam por li tiu tempo venis.

Pli ol antaŭe li havos tempon dediĉi sin al la Esperanto-laboro kaj do ni deziras ke li ankora dum multaj jaroj donu siajn plej bonajn fortojn al nia movado.

El «Fervojisto» — Organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda.

*

Fariĝu adoptanto de kolego por IFEF

Grandaj estas la devizaj baroj en orientaj landoj. La tieaj asocioj nur por parto el siaj anoj povas transpagi kotizojn al okcidenta lando. Same en Hindujo, Maroko kaj aliaj subevoluitaj landoj. Tamen, ĉie IFEF devus starigi kernon, el kiu povas evoluigi landaj asocioj. Ni sendas al aro el ili nian organon. Sed, estus por multaj kolegoj honoro, fariĝi membro de IFEF. Tio sendube fortigus ilin en sia agado por la internacia lingvo.

Pro tio la IFEF-estraro vokas al solidareco kaj kore petas gekolegojn en pagipovaj landoj pagi la IFEF-kotizon por unu aŭ pluraj kolegoj en nepagipovaj landoj. Se eblas, promesu tion por 2—3 jaroj eĉ.

Laŭeble la IFEF-kasisto informos vin pri la nomo de la adoptota kolego por ke vi havu kontakton kun li. La poŝtara adopta kotizo estas sv.fr. 3,00.

Ni dankas al via landa asocio, ke ĝi pretas peradi al IFEF vian adoptan kotizon.

Dankon por via komprenemon kaj amikajn salutojn.

Otto Walder, IFEF-kasisto.

Mi volas insiste peti al vi ĉiuj plenumi ĉi tiun gravan alvokon de la IFEF-kasisto.

Uzu multnombro la eblecon tiamaniere helpi niajn kolegojn kaj fortiĝi IFEF-on.

La sumon, sv.fr. 3,00 — 5,10 norvegaj kronoj po adoptota kolego po jare, vi povas pagi al mi.

Odd Kolbrek,
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9..

*

KOMUNISMO

Ree la aktiva «Fremdlingva Eldonejo», Pekino, elsendis kaje-rojn kun paroladoj de la ĉina prezidanto de komunisto partio, Mao Zedong. La nunaj havas la titolojn «Pri praktiko», «Zorgu la vivon de la amasoj, priatentu metodojn de laboro», Interparolo kun Usona ĵurnalisto Anna Louise Strong», kaj «Raporto al la dua plena sesio de la sepa centra komitato de la komunisto partio de Ĉinio.»

R

Ni ricevis:

Josemaria Eseriva de Balaguer: Vojo. El la hispana tradukis Nikolas Lopez Escariu. Eld. Ediciones Rialp, Madrid 1968.

*

Halvelik, Manuel: Kwasaroj . . . ĉu estigantaj sunsistemoj?

*

Orjubileo de Skolta Esperantista Ligo de F. Douglas Murphy. Skolta Esperantista Ligo 1968.

Modesta, multobligita kajero substrekas la 50-jaran ekziston de Skolta Esperantista Ligo, kaj

donas ties historion al ni, ek de la naskigo dum la unua mondmilito al la granda atingiĝo ĉi-somere, kiam Esperanto igis la dua lingvo dum la jamboreo en Essex, lau iniciato de la anglaj, neesperantistaj, organizantoj. La multobligita laboro estas bele farita. Prezo de la kajero estas 1 krono (+ sendkostoj).

Norvega Kroniko

Studenta aktiveco

Kiel konate, la 15-an de majo ĉijare fondiĝis Studenta Esperanto-societo (norveglingve Studentenes, Esperantoforening). Nun mi povas raporti pri tri iniciatoj de la nove fondita organizaĵo.

La unua estas publika kunveno la 2-an de oktobro en aŭditorio de la universitato en Blindern, Oslo. J. H. Rosbach prelegis pri E-o ĝenerale, kaj C. Støp-Bowitz skizis la rolon de E-o en la scienco. Ambaŭ prelegantoj prezentis la temon en sobra maniero, sen ĝena fanatikeco, kaj oni invitis al diskuto kaj demandoj post la prelegoj. La diskuto ne fariĝis tre vigla, ĉar la prelegantoj prezentis la movadon tiel klare, ke oni ne povis trovi multajn kontraŭargumentojn, kaj la nombro de ĉeestantoj estis malesperige malalta.

Tamen la situacio ne estis tiom malesperiga, kiom indikas la nombro da ĉeestantoj. Unu el la celoj de la kunveno estis starigo de komenca kurso. Kion ni sukcese

atingis. Ekde la 8-a de oktobro en la universitato funkcias kurso kun 14 partoprenantoj. La kurson gvidas C. Støp-Bowitz, kaj estas realece esperi, ke la nunaj gekursanoj formos la kernon de Studenta Esperanto-societo.

La tria parto de la raporto koncernas la ĝeneralan kunvenon, kiu okazis la 15-an de oktobro. Ĝia tagordo konsistis el fikso de la organiza stato de SES, alprenado de statuto kaj elekto de estraro kaj komisiitoj. Oni decidis, ke SES estu sekcio de Klubo Esperantista en Oslo, sed provizore oni faris nenium decidon pri la formo de kunlaboro kun Studenta Tutmonda Esperantista Ligo. La statuto de SES esence konformas kun la modelo de statuto ellaborita de NEL. La alprenado de statuto ebligas, ke SES estos menciita en la prelegkatalogo de la universitato, valida en la printempa semestro de 1969. Oni elektis la jenan estraron: prezidanto: Ole Skaane, vicprezidanto: Nils Chr. Stenseth, sekretario: Harald Støp-Bowitz, kasisto: Karin Fjellhammer, estrarano: Otto Prytz, Anstataŭantoj: Lars Groot kaj Tone Reinskou, revizoroj: Truls Reinskou kaj Lisbeth Rastad. Studgvidanto: Carl Støp-Bowitz, komisiito pri informado: Nils Chr. Stenseth, komisiito de la eldonejo Harald Støp-Bowitz, kaj raportanto al Norvega Esperantisto Otto Prytz.

Studenta Esperanto-societo nun staras sur organiza bazo Ni esperu, ke ĝi ankaŭ kapablos agi por sia celo: disvastigi E-on inter akade-

mianoj. Same mi esperas, ke simi-
 laj societoj ekaperos ankaŭ en la
 aliaj studentaj medioj de nia lando.
 Tian formon de konkurenco ni
 volonte akceptos.

Otto Prytz.

*

Meza distrikto

La prez. malfermis la kunvenon
 dezirante bonvenon al vera skan-
 dinava kunveno kun partoprenan-
 toj el tri landoj: Danujo, Svedujo
 kaj Norvegujo.

La prez. voĉlegis la estraran jar-
 raporton por 1966/68. Ĝi estis
 aprobita. La prez. menciis, ke la
 klubo en Skorovatn malfondiĝis.
 La membroj fariĝos rektaj mem-
 broj de NEL.

La kasisto prezentis jarkalkulon
 por 1966 kaj 1967. La jarkalkulo
 estis aprobita.

Oni poste diskutis kelkajn ŝan-
 ĝojn en la statutoj de la Distrikto.

Tiam sekvis la elektoj, kaj jenaj
 personoj estis elektitaj por 1968/
 70: Prez.: Lars Kåre Hunnes,
 Sekr.: David Termén (nova) Kas.:
 Kristian Fleischer. Anoj: Arne
 Olav Mjøen (nova), f-ino Lif Berg.
 Anst.: Halvdan Karterud (nova),
 f-ino Else-Margrethe Müller (no-
 va). Rev.: Erling Anker Haugen.
 R.anst.: s-ino Aslaug Karterud
 (nova).

Ĉeestis la jarkunvenon 14 mem-
 broj.

LKH

Orienta distrikto de N. E. L.

okazigis ĝeneralen kunvenon sa-
 baton la 26an de Oktobro ĉe la
 prezidanto, Tore Haug, Oslo. Ĉe-
 estis nur 8 membroj, ĉiuj el Oslo.
 La kalkuloj pri 1966 kaj 1967
 estis unuanime aprobitaj. Ĉar la
 prezidanto, Tore Haug, kaj la
 sekretario, Alfred Skyberg, ne po-
 vis akcepti reelekton, la elektoj
 rezultis jene: prezidanto Otto
 Prytz, sekretariino Annalise Torg-
 nes, kasisto Kaare Myhr (reelekto).
 Anstataŭantoj Kirsten Gustavsen
 (reelekto) kaj Tore Haug. — Post
 la elektoj oni iom diskutis la prok-
 simajn labortaskojn, kaj decidis
 klopodi por starigi Esperanto-
 movadon en Lillehammer.

*

La Esperantoklubo de Bergen.

La unua kunveno ĉi tiun sezo-
 non okazis la 19. de septembro en
 la hejmo de Annemor Bye.

La prez. Åshild Birkenes gvidis.
 Kjell Offerdal havis kiel kutime
 sian programpunkton. Li prezentis
 vortojn el kiuj ni faru novajn vor-
 tojn per kunligo aŭ per sufiksoj aŭ
 prefiksoj.

Li ankaŭ rakontis pri korespon-
 dado inter la ĉi tiea turista komi-
 tato. Den Nasjonale Scene kaj
 jugoslavo, koncerne propono de
 la lastaj pri marioneta teatra pre-
 zentado ĉi tie. Poste estis diskuto
 pri lingvaj demandoj kaj kluba
 laboro dum la venonta sezono.

Iuj eksterlandanoj vizitis nin
 dum la somero.

La jugoslava fr.ino Zlata Zacho
 estis gasto de Åshild Birkenes en
 majoj.

11/8 vizitis nin la izraelaj geed-
 zoj Bavmohl kaj la anglaj geedzoj
 Wells. Klubanoj salutis ilin en la
 hejmo de ges.roj Sivertsen.

La klubo aranĝis 4/9 kune kun
 «Bondeungdomslaget Ervingen»
 publikan kunvenon kie s.ro Hal-
 der el Hindujo paroladis pri «Taga
 vivo en hinda vilaĝo». Kjell Offer-
 dal tradukis. Ĉeestis multaj homoj,
 kaj ni havis la impreson ke mul-
 taj ĉeestantoj interesiĝis.

La 2an de oktobro ni kunvenis
 en Toms Hotel al «Jugoslava ves-
 pero».

La jugoslavo Iu-viĉ (filo de iu)
 aperis en la staturo de Kjell Offer-
 dal.

Li pasigis sian ferion en Jugo-
 slavio, kaj kiel kutime li serĉis
 kamparajn regionojn, mallarĝajn
 vojojn aŭ naturon kie li ne trovis
 vojojn.

Dum la mallonga tempo li es-
 ploris multon pri la lando. Li pri-
 traktis tagon vivon, landan moron,
 novajn kaj malnovajn konstrua-
 ĵojn k.a. Tial lia parolado estis tre
 interesa.

Li montris belajn fotgrafaĵojn
 faritajn dum sia restado. Åshild
 Birkenes tre lerte tradukis.

Post la parolado kluba aferoj
 estis pritraktataj.

*

En la agrabla hejmo de Leonora
 kaj Kristian Sivertsen ni kunvenis
 la 17. de okt. La geedzoj Sivertsen
 prizorgis la programon, kies ĉefa

punkto estis «Universalaj Deklara-
 cioj de Homaj Rajtoj».

Kristian Sivertsen poste tre lerte
 legis de li mem verkitan humoran
 fabelon pri la diversaj gramatikaj
 formoj kaj vortklasoj prezentitaj
 kiel personoj.

Poste, diskutado pri internaj
 aferoj.

Kantado kaj kafopauzo ĉiam
 troviĝas en nia programo.

La 30. de oktobro nia 34-jara
 festo okazis en Toms Hotel. Doris
 Birkelund gvidis kaj deziris bon-
 venon al la tablo kiu estis bele
 pretigita kaj logis per bongusta
 manĝaĵo.

Åshild Birkenes dum sia fest-
 parolado honoris la fondintojn, kaj
 speciale salutis tiujn tri kiuj nun
 partoprenis la feston: Kjell Offer-
 dal, kaj Jenny kaj Johs Jahren.

Trygve Davanger diris belajn
 vortojn por la virinoj, kaj Agnes
 Hennemann vigle parolis por la
 viroj. Post ambaŭ paroladoj sek-
 vis harmoniaj kantoj.

Kjell Offerdal dankis pro man-
 ĝaĵo. Dum la posta kunestado
 Jenny Dahl estis honorata per la
 kluba medalo pro 20-jara fidela
 laboro. Thora Horntvedt, kiu an-
 kaŭ meritis tion, pro malsano ne
 ĉeestis.

La programo cetere variis inter
 babilado, ŝercaj rakontetoj kaj
 kantado miksitaj je sonbenda mu-
 ziko.

Johs Jahren.

★

MARA VENTO finis la antaŭferian labor-sezonon kunvenante la 30-an de majo. Ni komencis kantante kaj post bonvenigaj vortoj la prezidanto transdonis la parolon al s-ro Svein Lunde kiu en vigla kaj amuza maniero rakontis pri somera vizito en Sovet-Unio. Per plaĉaj kaj interesaj kolorlumbildoj kaj akompana rakontado li konigis al ni tre vidindajn partojn de tiu vasta lando. Vortebilde li priskribis rusajn arkitekturajn konstru-arton kaj donis karakterizajn ekzemplojn pri la granda riĉo de rusaj art-trezoroj.

La interesokaptan rakontadon sekvis meritita danko aplaŭdo al la programulo. Poste ni kantis kaj vigis interparolis.

*

MARA VENTO okazigis la unuan postferian kunvenon la 6-an de septembro en KFUK. La prezidanto malfermis bonvenigante kaj dezirante sukcesan novan labor-sezonon. Specialan bonvenon li rektis al la hinda gasto Abani HALDER, la programulo de la vespero.

S-ano Halder tre vigle, interese kaj instrue rakontis pri vivo, kutimoj kaj moroj en hinda vilaĝo. La paroladon li akompanis per belaj kaj interesaj kolorlumbildoj montrante karakterizajn trajtojn de hinda skulptado, ornam- kaj pentroarto.

Li ankaŭ aŭdigis hindajn popolmuzikon kaj kantojn per sonbendo kaj cetere mem kantis kelkajn kantojn en la lingvo bengali. Estis programo tre ŝatata kaj la ĉeestan-

toj dankis la simpatian gaston per forta aplaŭdo.

En la kunveno estis informate ke la venont-jara Universala kongreso okazos en Helsinki kaj estas la intenco aranĝi komunan vojaĝon al la kongres-lando.

Oto

*

Sauda Esperantoklubb

kunvenis la 8an de septembro. Alvenis por prelegi la hindo Abani Halder, kiu rakontis pri sia vilaĝo en Hindujo, kaj per sia rakontado ankaŭ tuŝis la problemojn de Hindujo en la nuno.: Poste ni rigardis tri belajn kaj tre interesajn filmojn pri la dancado kaj popolaj kantoj, filmoj kiuj vere ravis nin, kvankam ni devis bedaŭri ke la akompana teksto estis en la angla lingvo kaj ne en Esperanto.

La kunvenon ĉeestis 15 samideanoj, inter ili du membroj de la Odda-klubo kiuj veturis trans la montaron por kunesti en la kunveno.

*

Sauda Esperantoklubb

kunvenis 25. 10. en Spiderhuset. La kunveno estis dediĉita al Hispanujo. Elna Matland unue rakontis pri la kongreso en Madrid, kaj travivaĵoj dum la kongresa semajno. Poste Johan Matland per interese parolado kaj belaj kolorlumbildoj vivigis por ni Hispanujon, kaj ni ĉiuj ĝuis la somerajn memoraĵojn de la esperanta familio Matland. Antaŭ la kongreso ili vizitis Kastelon Gresillon en Francujo, kie la francaj esperantistoj aranĝas

kulturajn semajnojn ĉiun jaron.

Hispana muziko akompanis kelkajn el la bildoj, kaj la preleganto montriĝis tre taŭga ludanto per la kastanjetoj!

Post bonvena kafopaŭzo, ni elotis esperantan libron, kaj la kutimo estas ke la gajninto aĉetu novan libron por la venonta kunveno.

Sokr.

*

Kurso pri FN en Sauda.

La 12an kaj 13an de Oktobro okazis en Sauda kurso aranĝita de FN'S Rogalandsavdeling. Oni invitis reprezentantojn de organizaĵoj en la norda distrikto de Rogaland, kaj ankaŭ sendis inviton al Sauda Esperantoklubb. Elna kaj Johan Matland reprezentis la klubon.

Sabaton oni post enkonduko de Ottar Birkeli diskutis la rolon de FN kiel interpopolan proksimigan faktoron, kaj ankaŭ kiel ni povas uzi la deklaron de Homaj Rajtoj por krei popolan opinion en nia socio.

La partoprenantoj laboris en grupoj, kaj poste en Plenumo prezentis la konkludojn.

En la dimanĉo Arne Fjærtøft, kiu mem estis en Ceylon por labori inter la gejunuloj tie, Parolis pri «Praktisk Utviklingshjelp» kaj ankaŭ tiu parolado donis bazon por interese kaj fruktodona gruplaboro.

Estas interese konstati ke FN-sambandets Rogalandsavdeling tiel konsciiĝas pri la signifo de Sauda

Esperantoklubb ke oni invitas reprezentantojn de la klubo al tia kurso. Estas nenecese diri ke la esperantistaj reprezentantoj trovis konvenan okazon en siaj grupoj pritrakti dum la laboro pri la homaj rajtoj la lingvan diskriminacion kiu okazas hodiaŭ en la mondo, en la diversaj medioj. Gesamideanoj, se vi iel havas kontakton kun parencaj organizaĵoj, kiel ekzemple FN, vi utiligu tiun kontakton. Per tio vi montras ke la esperantistoj interesiĝas pri interpopolaj aferoj, kaj vi samtempe havas okazon rakonti al homoj pri la stato de la internacia Esperanto movado rilate al FN kaj Unesco.

E. M.

*

Klubo Esperantista en Oslo.

16/9.68. La prez. John Berggreen deziris koran bonvenon al la kunveno. Samtempe li memorigis pri la nova Esperanto-kurso por komencantoj en Aars & Voss Lernejo, kaj petis la ĉeestantojn varbi al la kurso. Cetere li informis ke fenestra Esperanto-Ekspozicio okazos en Arbeidernes Bok- og papirhandel ĉe Youngstorget post 2 tagoj.

La programo konsistis el kongres-raportoj.

Ludvig Anjer raportis pri la Universala Kongreso en Madrid. Li rakontis pri sia vojaĝo al la ĉefurbo de Hispanujo, pri la diversaj okazintaĵoj kaj la oficialaj partoj de la kongreso, resolucioj k.t.p. L. Anjer ankaŭ montris multajn belegajn kolorlumbildojn de San Sebastian, Burgos, Segovia, Mad-

ko Takaĉ kaj la malavaraj aĉetantoj!

rid kaj donis impresojn de la kongresa etoso.

Otto Prytz raportis pri sia partopreno en la Junulara Kongreso en Tarragona la semajnon antaŭ la kongreso en Madrid. El 130 aliĝintoj de 21 landoj partoprenis proks. 100. Zamenhof-strato inaŭgurigis en Tarragona dum la Junulara kongreso. Oni ankaŭ inaŭguris kabanon konstruitan de la esperantistoj mem, kaj «Fraŭlino Esperanto» elektiĝis.

Rolf Bugge-Paulsen montris memorajojn akiritajn en Hispanujo.

3/10.68. Estis prelego de Annalise Torgnes: «Impresoj pri Esperanto-agado en Finnuloj» ŝi ricevis stipendion por studi finnan lingvon, kaj kontaktis finnajn esperantajn amikojn, kaj jam en Turku ili renkontis ŝin. En la Universitato en Turku kaj ankaŭ dum la kulturtagoj en Jyväskylä okazis kursoj en Esperanto. Plue ŝi vizitis kampadejon en Isoranta en Sysmä, proks. unu horo de Lahti. En la kampadejo okazis esperantokurso.

La prez. informis ke 5 kopioj de la Oslo-f... esperanta teksto cirkulas tra la tuta mondo. Nun la Turisttrafika Asocio por Oslo kaj Cirkaŭaĵo intencas esperantigi novan filmon pri Oslo.

Pakaŭkcio sub gvidado de Einar Gustavsen alportis la belan sumon de kr. 111,00 al la kluba kaso. Koran dankon al la donacinto ĉel-

21/10.68. John Berggren, bonvenigis precipe nian gaston Stefan Murak, kiu estas membro de la nova Studenta Esperanto Societo.

La kunveno estis dediĉita al La Deklaracio de Homaj Rajtoj. John Berggren enkondukis kaj C. Støp-Bowitz donis superrigardon pri la evoluo de la Mezepoko, ĝis la nuntempa Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Li klarigis pri la diversaj partoj de la deklaracio, atentigis pri la lingva diskriminacio.

Otto Prytz proponis sendi saluton al la Generala Sekretario de U.N.O.

Raportis Harda Danielsen.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,

Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —

Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj

sendaĵoj. — Telefono: 54 727